

ĈEA-retkomunikoj 2011/04

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. VORTOJ DE LA ĈEFDELEGITO
3. ĈEA-KONGRESO
4. RAPORTO PRI VIKIMANIO
5. PROKSMIĜAS GRAVA JUBILEO!
6. Aktualajetoj kaj aktualajtoj
7. ĈEJ AKTIVAS
8. Listo de aranĝoj

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Ĉi tio estas dua numero de ĈEA-retkomunikoj, kiun preparas nova redaktoro, Miroslav Hruška. Samtempe ĝi estas unua numero de ĈEA-retkomunikoj, kiu ekzistas ankaŭ en PDF. Mi atendas viajn proponojn kaj komentojn, ne timu skribi al mi iun ajn proponon, kion vi ŝatus trovi en la Retkomunikoj, kion vi ŝanĝus ktp. Kompreneble, mi kun ĝojo legos viajn kontribuojn kaj raportojn aŭ raportetojn. Adreso por kontribuoj: miropiro2312@gmail.com. En mia plano estas eldonado de kvinanumero antaŭ Kristnasko, do volonte sendu kontribuojn.

2. VORTOJ DE LA ĈEFDELEGITO

Individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĉeĥio ricevos baldaŭ de mi apartan pli detalan sciigon. Ĉi tiuj vortoj direktiĝas precipe al tiuj ĉeĥaj esperantistoj, kiuj ne membras en UEA. Verŝajne vi scias, ke UEA estas la plej grava Esperanto-organizaĵo en la mondo: ne nur ĉar ĝia membraro estas nekompareble pli grandnombra ol ĉiuj ceteraj Esperanto-organizaĵoj, ke ĝi havas oficialajn rilatojn kun UN kaj Unesko, kiuj tiel agnoskas ĝin



esti la ĉefa reprezentanto de esperantistaro, sed ĝia ĉiujare aktualigita Jarlibro enhavas perfektan trarigardon pri la Esperanto-movado en la mondo, ĝi havas unikan reton de 1673 helpemaj delegitoj en 103 landoj tra la mondo, informas pri E-akademioj, E-kulturo, ktp., ĉiujare ĝi organizas Universalajn kongresojn kiu donas eblon prezentiĝi al ĉiuj E-asocioj, posedas ampleksan bibliotekon, kaj nelaste ĝi administras la plej grandan libroservon (momente kun 6882 titoloj). Sed ĝi ankaŭ havas multajn elspezojn ne nur kun la administrado kaj eldonado de la asocia organo Esperanto, sed ankaŭ pere de diversaj fondusoj ĝi diversmaniere helpas al esperantistoj en la mondo, kiuj tion nepre bezonas, subtenas Esperanto-bibliotekojn, ktp.

La individuaj membroj havas diversajn avantaĝojn, ekzemple rabatojn aliĝante al la UK-oj, rabatojn mendante librojn de la libroservo kaj aliajn, tamen la kialo por aliĝi ne estas nur ke ĝi donas materiajn avantaĝojn. Certe povas esti afero de fiero esti membro de tiuspeca Esperanto-Asocio por ĉiu serioza esperantisto. Estas pluraj membrokategorioj, do ĉiu povas aliĝi laŭ siaj intereso kaj financaj ebloj. Pli da informoj pri UEA estas troveblaj en riĉa paĝaro www.uea.org aŭ pere de mia retadreso chrdle@kava-pech.cz.

Petro Chrdle, UEA-ĉefdelegito por Ĉeĥio

3. ĈEA-KONGRESO

Inter la 7-a ĝis la 9-a de oktobro okazis en Šumperk La 13-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Sabate, la 8-an de oktobro estis elektita nova estraro, kiu dum sekvontaj 3 jaroj laboros en konsisto: Vladimír Dvořák – prezidanto, Libuše Hýblová – vicprezidanto, Libuše Dvořáková – vicprezidanto, Vratislav Hirš-kasisto, Pavla Dvořáková – membro, Miroslav Malovec- membro, Miroslav Hruška – membro. Estis aprobitaj kvin novaj honoraj membroj – Jindřiška Drahotová, Viktor Dvořák, Miroslav Malovec, Margit Turková kaj Čestmír Vidman. Medalionoj aperos en la sekva numero de Starto. Estis konfirmite, ke la nova oficiala sidejo de ĈEA fariĝas Svitavy. Adreso: Český esperantský svaz (Ĉeĥa Esperanto-Asocio), náměstí Míru 1, CZ-568 02 Svitavy

Detale pri la kongreso legu kaj la fotogalerion trovu en jena artikolo:

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/13-a-kongreso-de-ea.html>

Nomoj, kompetentecoj kaj kontaktoj al la novaj estraranoj de ĈEA vi trovas en:

<http://www.esperanto.cz/eo/kontaktoj-kaj-organizoj/cxeĥa-esperanto-asocio/cxea-estraro>

Teksto de la nove akceptita statuto estas trovebla en <http://www.esperanto.cz/cs/kontakty-a-organizace/cesky-esperantsky-svaz/co-je-ces> (dume nur ĉeĥlingve)

Malgranda fotogalerio pri la aranĝo troviĝas en <http://www.ipernity.com/doc/181031/album/252280>

4. RAPORTO PRI VIKIMANIO



Dum solena prelega kaj muzika programo

Inter la 26-a kaj la 30-a de oktobro okazis en Svitavy Vikimania: historie unua unika internacia renkontiĝo de esperantistoj-vikipediistoj kaj interesiĝantoj pri la interreta enciklopedio Vikipedio omaĝe al dekjariĝo de ĝia Esperanta versio. Partoprenis ĝin 33 interesitoj en 9 landoj (Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Germanio, Belgio, Nederlando, Francio, Hungario + usonaj ŝtatoj loĝantaj nuntempe alilande). La aranĝon, kiu okazis kun financa subteno de la urbo Svitavy kaj de la Regiono Pardubice, ĉeforganizis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun E@I, la loka Esperanto-klubo kaj la loka gimnazio. Ĵaŭde la 27-an de oktobro la partoprenantoj estis solene akceptitaj ĉe la urbestro de Svitavy, sinjoro David Šimek. Sekvis tuttaga vikipedia trejnado ĉe komputiloj por kaj progresintoj kaj komencantoj, (inkluzive lokan neesperantan publikon), verkado de artikoloj pri la urbo kaj la regiono, okazis prelegoj (ne nur pri Vikipedio mem) kaj kunvenis specialaj laborgrupoj. Solena prelega kaj muzika programo ("matineo") omaĝe al dekjariĝo de la Vikipedio en Esperanto okazis vendrede la 28-an de oktobro en kultura salonego de la Domo de Ottendorfer kaj sekva tosto en Esperanto-muzeo. La solenaĵon kaj sekvan posttagmezan seminarion pri aktualaĵoj en la ĈEA-retejoj partoprenis tiutage multaj pluaj ĉeĥaj esperantistoj Sabata ekskurso gvidis al la urbo Litomyšl kaj ties kastelo, inkluzive de omaĝo super la tombo de Karel Pič. Sekvajare vikipediistoj planas renkontiĝi en novembro 2012 kadre de KAEST en Modra (Slovakio).

Pli da detaloj vi trovos en artikolo pri Vikimania en Vikipedio http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanta_Vikimania kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Rezultoj_de_Esperanta_Vikimania_2011 kaj ankaŭ en paĝaro de ĈEA: <http://www.esperanto.cz/eo/aktualy/esperanta-wikipedia-festis-sian-dekjari-on-dum-vikimania.html>

Ligilojn al ĉeĥlingvaj televid- kaj radioriporto pri la aranĝoj vi trovos en <http://www.esperanto.cz/cs/aktualy/wikimanie-v-ceskych-mediich.html> kaj <http://www.esperanto.cz/cs/aktualy/ohlasy-na-esperantskou-wikimani-a-vysledky-prace-jejich-ucastniku.html>

Fotogalerio de la aranĝo troviĝas en <http://www.ipernity.com/doc/181031/album/256109>

5. PROKSMIĜAS GRAVA JUBILEO!

En la 26a de julio, 2012, ni markos la 125-jaran jubileon de la aperigo de la Unua Libro. Tio estas la plej signifa jubileo tra la sekvaj kvin jaroj. Pasintan novembron ILEI lanĉis projekton 'esperanto125' por utiligi tiun datrevenon. Por reciproka kunlaboro kaj informado ILEI volas havi en unuopaj landoj landajn reprezentantojn kaj laborgrupojn. Mi konsentis fariĝi reprezentanto kaj la laborgrupo plue konsistas el Miroslav Hruška, Miroslav Malovec kaj Jana Melichárková. Por sukceso de la projekto gravas ekaktivigo de ĉiuj kluboj, rondetoj kaj unuopaj esperantistoj. Temas precipe pri informado kaj lingvaj kursoj, kiujn devus organizi laŭ eble ĉiu rondeto aŭ klubo. Informante pri la jubileo en amaskomunikiloj eblas informi publikon entute pri Esperanto, ĝia utileco kaj uzebleco en internacia komunikado kaj kiel helpilo en lernado de plua(j) fremda(j) lingvo(j). Dank' al tia plialtigo de tre malmultaj (laŭ mia kaj certe ankaŭ laŭ via sperto) konoj de publiko pri Esperanto estos pli facile varbi en lingvajn kursojn. Instruado kaj lernado de la lingvo estas ununura, kaj do la plej grava ebleco, kiel disvastigi vicojn de E-parolantoj. Malgraŭ tio, ke Esperanto estas facile lernebla (sed ne facila!) lingvo, sen lernado ne eblas ĝin posedi. Por ke mi povu informi ILEI pri nia agado, ĉu pri publikigado de informoj, ĉu pri kursoj aŭ pri alia agado, mi bezonos informojn de vi kaj ankaŭ mi dissendos al vi konsilojn kaj instigojn, sed reciproke vi povas sendi la viajn al mi, por ke mi povu diskonigi ilin al ĉiuj.

Atendante ambaŭflankan bonan kunlaboron – Josef Vojáček, jvojesp@gmail.com

6. AKTUALAĴOJ

Kadre de la aŭtuna seminario en Skokovy estis sur la Pensiĝo Espero memoriga tabulo omaĝe al d-ro Josef Hradil. Dankon al kiuj, kiuj finance subtenis ĝian estigon.

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/nova-memoriga-tabulo.html>

7. ĈEJ AKTIVAS

ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) laŭ sukcesa eksterlanda modelo lanĉis konkurson "Lernu Esperanton kaj gajnu eksterlandan vojaĝon" en kiu junuloj dum tri monatoj akiru bazan scion de esperanto por gajni premion. La konkurso lanĉiĝis kune kun renovigita retpaĝaro de ĈEJ dum semajnfina renkontiĝo de ĈEJ en Žirovnice inter la 4-a kaj la 6-a de novembro, kiun partoprenis 7 ĈEJ-anoj, inkluzive de honora membro Max KAŠPARŮ kiu prelegis pri hipnozo kaj fariĝis patrono de la konkurso. Ni petas ĉiujn legantojn inviti al partopreno en la konkurso siajn ĉeĥajn parencojn kaj konatojn. Retejo de la konkurso: <http://soutez.esperanto.cz>

Fine de oktobro ĈEJ-anoj ĉeestis du paralelajn aranĝojn: De la 28-a ĝis la 30-a de oktobro ses personoj (Bára ZÁVODSKÁ, Vít G. MIŠUREC, Miloš HAVLÍČEK, Jan ŠEBETOVSKÝ, Jiří GALUŠKA, Dan MRÁZEK) partoprenis aktivulan trejnadon de GEJ kaj PEJ sur junulara ŝipo en Dresdeno. La Esperantan Vikimanion en Svitavy (26-a ĝis 30-a) kunorganizis Marek BLAHUŠ kaj Pavla DVOŘÁKOVÁ, du pliaj ĈEJ-anoj partoprenis (Michal MATÚŠOV prelegis). Ĵaŭde vizitis Dan MRÁZEK, vendrede Mirek HRUŠKA.

Per kreiva metiejo sub gvido de ĈEJ prezentiĝis esperanto kadre de publika aranĝo okaze de "Semajno de volontulado" (kaj samtema jaro de EU) la 2-an de novembro en Prago. Ĉeestis Bára ZÁVODSKÁ, Mirek HRUŠKA kaj Dan MRÁZEK, helpis pluraj pliaĝaj esperantistoj. Pri la evento raportis Ĉeĥa Radio (<http://tinyurl.com/crovolutado> - pri esperanto ekde 02:04).

Marek BLAHUŠ en Belgio ĉeestis Esperantan kafejon en Bruselo kaj plankunsidon por FESTO 2013 en Moresnet. Kiel staĝanto ĉe la Eŭropa Komisiono li instruas esperanton al 4 siaj kolegoj kaj intervjuiĝis en la reta ĵurnalo por la 639 staĝantoj (<http://tinyurl.com/stageechoeseo>). Li ankaŭ gastis en Nederlando. Brna klubo de ĈEJ kunvenis la 3-an de oktobro okaze de vizito de nederlanda biciklanto Ivo MIESEN (4 junuloj) kaj la 30-an de oktobro akceptis germanan partoprenintinon de Vikimano Ursula NIESERT (2 junuloj). La praga klubo kunvenis la 11-an de oktobro okaze de vizito de du kroataj esperantistoj. ĈEJ-estrarano Miroslav HRUŠKA elektiĝis la 8-an de oktobro en Šumperk en la estraron de ĈEA.

La nova retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/> kaj retpaĝaro de la konkurso por ĉeĥoj situas ĉe <http://soutez.esperanto.cz/>

8. LISTO DE ARANĜOJ

La plej proksimaj aranĝoj

2011-11-24: Prelego ĈINIO, KOREIO, JAPANIO – en Ostrov nad Ohří. Vojaĝprelego kun projekciado de Petr Chrdle en Urba biblioteko, Jáchymovská 224. Ekde 17h. Okazos ĉeĥlingve, inkluzivos ankaŭ mension pri avantaĝoj de scipovo de Esperanto.

ĝis 2011-11-30: MIGRA EKSPozICIO „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Česká Třebová. En Urba biblioteko (strato Smetanova 173 – surangule inter stratoj Smetanova kaj Riegrova, eniro en la malantaŭa parto de la bankokonstruaĵo. Retejo de la biblioteko: <http://knihovna.ceska-trebova.cz/> . Eniro estas senpaga.

2011-12-04: MARCIPANA KRISTNASKO – en Svitavy. Artateliero pri kreado de figuretoj el marcipano en Esperanto-muzeo (kaj okazo senpage trarigardi la tutjaran ekspozicion „Spiritaĵoj de la mondo kaj Esperanto“), bunta kristnaska programo en Urba muzeo kaj galerio, kulturcentro Fabrika, malnovĉeĥa jarfoiro en la ĉefplaco. Info: dvor.libuse@seznam.cz <http://www.esperanto.cz/eo/akce/marcipana-kristnasko-463.html>

2011-12-10: ANTAŬKRISTNASKA RENKONTIĜO – 10.12. en Písek: Adventa kultura matineo omaĝe al Tago de Esperanto-libro en la Urba biblioteko kaj adventa diskuto kun d-ro Max Kašparů (ankaŭ por ĝenerala publiko), vizito de la kristnaska ekspozicio kaj mineralogia borsoo, posttagmeza tradicia kristnaska programo. Info: pisek@esperanto.cz

2011-12-11: ESTANTE PILGRIMANTO EN LA 21-A JARCENTO – en SVITAVY Interesa prelego kaj rakontado de praga pentristo-esperantisto Stanislav Krajíček pri sia 300km longa piedirado sur Sanktajakoba vojo de León al Santiago de Compostela. En Esperanto-Muzeo ekde 14 h. Ebleco trarigardi samtempe la nunan ekspozicion „Spiritaĵoj de la mondo kaj Esperanto“. Okazos ĉeĥlingve, ankaŭ por la loka publiko. Info: dvor.libuse@seznam.cz <http://www.esperanto.cz/cs/akce/svatojakubska-pout-do-santiago-de-compostela-aneb-poutnikem-ve-21-stoleti-475.html>

2011-12-29/30: Tradicia Silvestro-balo en Česká Třebová. Tradicia-netradicia silvestra maskobalo kun multe da amuziĝo. Ĉi-jara ĉeftemo: Kiel belaj estas niaj legendoj ĉeĥaj... Info: jk.esperanto@seznam.cz

Aranĝoj en jaro 2012

2012-04-16-22: Lingva seminario de AEH en Skokovy Informoj ĉe Jindřiška Drahotová: drahotovaesperanto@seznam.cz

2012-06-12: Muzea nokto en Svitavy. Info: muzeagrupa@esperanto.cz

2012-07-01-/14, 07-15/28, 07-29/08/10: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: podhradska@volny.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2012-07-08/14: Turisma antaŭkonferenca renkontiĝo en Prago. Organizita precipe (sed ne nur) por la partoprenontoj de IEK en Svitavy. Oni loĝos en la hotelo Krystal kaj kun esperantlingva ĉiĉerono esploros Pragon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Info: chrdle@kava-pech.cz

2012-07-10/15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: Eva.Kopečna@ivax-cz.com

2012-07-14/20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz

2012-07-20/23: Poskonferenca turisma restado en Svitavy. Info: chrdle@kava-pech.cz

2012-08-10/12: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov.
Info: podhradska@volny.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk. Info: aei-ikeh@volny.cz

2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de austraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: www.esperanto.cz aŭ komitato@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al miropiro2312@gmail.com (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2011/4

Kontakto al ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – miropiro2312@gmail.com

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš